

& Tro homa sorto de iu neĝhomo:

< Rekante 31 el 59 batoj por strofo, entute 767 paŝoj dum 9 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (La stranga butiko, 1931). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:59> (

/mi mimi re doTi La Tido TiMi; mi mimi re doTi La Tido Ti; Mi MiMi La LaLa So
LaTi LaMi; mi mimi re rere do TiTi La

(#Rekantaĵe: MiLa do Lado mi; lala sofa mi re; lala somi miLa LaTi dodo TiTi La;
MiLa do Lado mi; lala sofa mi re; lala somi miLa LaTi dodo TiTi La a)

)×13)+

(&Strofoj:

'1 "/Inter la homoj li estis nur homo ;
Nerimarkita en fluo de l' viv'.." ; Estis
modesta nur neĝa atomo ; Treme
sidanta sur montodekliv';

(×:; **Falas neĝ' de ĉiel'** ; **Frosta
vintra tero ; Vilan lunon, brilan
sunon ; vidas la neĝer'** ; **Falis neĝ' de
ĉiel'** ; **Varmas la sufero ; Vilan lunon,
brilan sunon ; ploras la neĝer'**.)

'2 Tiam okazis, ke vento kaprice ;
Blovis sur ĝin kun afabla obstin'; – Tiel
la vento kelkfoje ofice ; Vojon elektas
de nia destin'.

'3 Nia atomo fariĝis neĝero ; Kiun la
vento tenadis en rul'; Vigle malsupren!
– kaj antaŭ vespero ; Nia neĝero jam
estis neĝbul'.

'4 Knaboj ĝin trovis sekvantan matenon
; Ĉe la piedo de l' monto kaj plu ; Rule
ĝin puŝis sur ludoterenon ; Kie
daŭriĝis de l' bul' evolu'.

'5 Mire la knaboj pri ĝia konturo ;
Ĝojis, – kaj lerte el tiu neĝkvant' ;
Baldaŭ leviĝis en ombro de muro ;
Homomajeste la neĝogigant'.

'6 Baskojn de l' frako vivige agitis ;
Vento petola tra vintra pejzaĝ'; Du
karbopecoj perfekte imitis ; Homan
rigardon en lia vizaĝ'.

'7 Brave minace, kun pluvoombrelo ;
Firme li staris sur piedestal'; Jam
rekompence pro longa fidelo ; Sur lia
brusto orbrilis medal'.

'8 Nun fanfarone li levis la nazon ;
Nazon imponan en form' de kukurb' ;
Ĉar por fieri la havis okazon ; Venis
aklami lin tuta la urb'.

'9 Ĉiuj admiris la belan statuon ; Rime
prikantis lin moda poet' ; Kelkaj eĉ
havis kun li intervjuon ; Kiun (kun
bildoj) publikis gazet'.

'10 Tiam li estis la plej populara ;
Homo de l' urbo, – li estis idol' ; Tiel,
ke burĝo eĉ laŭdoavara ; Diris: "Al tiu
nur mankas parol'!"

'11 Iun matenon – (klarigu laŭvole ;
Tian miraklon, – ĝi estas ja fakt') – Nia
neĝhomo diskutis parole ; Kun
admirantoj pri nova kontrakt'.

'12 "Ĉar disvastiĝis tra l' mond' mia
gloro ; Kial modesti en ombro de
mur' ? ; Kadro pri brila el suno kaj oro ;
Bone konvenus al mia statur'."

'13 Certe, li pravis, – kun mil priatentoj
; Oni lin ŝovis ĝis suna teras'.. ; Kaj
post tri tagoj nur kotaj fragmentoj ;
restis memore pri pompa neĝmas'.